Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

La 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto • 17 – 24 julio

La Kolombo de Paco

23-a de julio 2021, numero 12

Redaktas Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova

IKU-AIS: ĉirkaŭ 50 ekzamenitoj, Scienca Forumo

Ekde 1995 regule okazas kune kun la Internacia Kongresa Universitato ankaŭ tri kursoj de Akademio Internacia de la Sciencoj. Ĉi-foje escepte okazis kvar kursoj, ĉiu konsistanta el IKU-prelego kaj daŭriga AIS-prelego, fine de kiu estis ekzameneto. La rezultoj aperas en la tabelo. Ricevintoj de la maksimuma noto:

IKU/AIS1 (Nigraj truoj kaj gravitaj ondoj) Silvio Curtis kaj Miguel Bento.

IKU/AIS2 (Fraktoj) Miguel Bento kaj Johan Swenker.

IKU/AIS3 (Lunvojaĝado) Anders Sundman, Cvi Ŝolt kaj A. Wandel.

En la kvara ekzameno (okazinta la 23.07.2021) ankoraŭ ne alvenis la limtempo por liveri la solvon de la ekzamena demando.







Kursnomo	Preleganto	Partoprenantoj unua prelego	Partoprenantoj dua prelego	Partoprenantoj ekzameno
Nigraj Truoj	Amri Wandel	160	60	23
Fraktoj	Jesper Jacobsen	60	30	10
Lunvojaĝado	Francesco Maurelli	60	30	11
Komputada Kemio	Orlando Raola	50	20	

Ĉiuj ekzamenitoj ricevos AIS-ateston, kaj la elstaraj notoj estos menciitaj en la Scienca Forumo, dum kiu ankaŭ okazos diskuto pri la estonteco de scienca agado en Esperantujo.

La IKU-libro, kiu enhavas krom la tekstoj de la kvar IKU-AIS-kursoj ankaŭ 4 aldonajn IKU-prelegojn, 4 prelegojn de la Scienca Kafejo kaj du prelegoj de SUS-37 (Scienca Universitata Sesio) de AIS jam estis elŝutitaj de pli ol 700 kongresanoj. Senpage elŝuti la 135-paĝan IKU-libron eblas ĉe http://iku2.trovu.com.

Vizitu la Sciencan Forumon morgaŭ, la 24-an de julio je la 12.00 laŭ UTC!

Gravas la kompleta interkomunika sperto

Stefan MacGill

Jen la esenco de la interveno de d-ro Duncan Charters, Prezidanto de UEA, al la 74-a Seminario pri Aktivula Maturigo. Li parolis libere tra 50 minutoj prezentante spertojn kaj memorojn el sia periodo de Esperanto-lernado kaj uzado. El tio li tiris kelkajn kernajn mesaĝojn. Unue, niaj planoj devas esti pli daŭripovaj. Malsufiĉas instrui nur la lingvon, devas ĉeesti la kultura kunteksto, en kiu ni evoluigu la komunikadajn kapablojn, kio antaŭsupozas la uzon kaj maturigon de interkulturaj spertoj. Gravegas frue en kurso malkovri la interesojn de la kursanoj, kaj pluiri laŭ tiuj, ne laŭ strikte formulita plano.

Intervenis la ĝenerala sekretario de UEA, Aleks Kadar (Francio), kun bone formulita listo de bezonoj por sukcesaj Eŭropaj projektoj, Ileana Schroeder (Danlando), kiu kuraĝigis pliajn landojn starigi petojn por projektoj, cele al financado de la Eŭropaj instancoj, Fernando Maia Jr. (Brazilo), vic-prezidanto de UEA, kun novaj informoj pri la kunlaboro inter UEA kaj la alloga evento SES en Slovakio kaj Anna Löwenstein pri la bezono por pli konvenaj formoj de unua kontakto kun la komunumo por kursfinintoj, ekzemple la retejo https://facila.org.

La partoprenantaro iomete variis, sed atingis pinton de 46 personoj: el Argentino, Benino, Brazilo, Britio, Ĉinio, Ĉeĥio, Danlando, Francio, Germanio, Hispanio, Hungario, Israelo, Italio, Japanio, Kolombio, Kongo DR, Koreio, Meksiko, Mongolio, Nederlando, Norvegio, Rusio, Serbio, Svislando, Tajvano (Ĉinio), Ukrainio kaj Usono. Sume, el 27 landoj. Dekkvino da homoj diskutis aŭ salutis.

Post prezento de la enkonduko, vaste dissendita, apud la fino de la trihora sesio, la patro de AMO, Stefan MacGill, prezentis novan proponon por ligi kursfinintojn iel al la komunumo. Tion en la 21a de julio traktis la Eŭropa Komisiono ene de VK2 sub la gvido de Renato Corsetti, kiu plusekve aktivis ankaŭ en AMO 74. Pro la seminario la komisiono ricevis kelkajn novajn ideojn, al kiuj ĝi revenos ĉe la fino de la kongresa periodo. Io konkreta rezultos!

Medicinistoj modernigas sin

La 116-a numero de la *Medicina Internacia Revuo* (MIR) estis preparita uzante la aĉetitan de Farmacia Fakultato de Medicina Kolegio de Jagelona Universitato novan version de la komputila programo QuarkX Press, kiu ebligas plibonigi la eldonkvaliton de la menciita revuo. En la plejlasta numero de MIR aperas artikoloj prezentitaj dum la 21-a Kongreso de UMEA: IMEK. UMEA informas, ke la 22-a IMEK denove okazos en la urbo Hódmezővásárhely (Hungario) kaj Szeged en julio 2022. La kunorganizanto de la 22-a IMEK estos Farmacia Fakultato de la Medicina Universitato en Szeged sub gvido de Dekano Prof. Dr habil. István Zupkó kaj Vic-dekano prof. dr habil. Zsolt Szakonyi. Pri la scienca programo de tiu ĉi grava kunveno estis decidite dum vizito de oficiala delegacio de Farmacia Fakultato de Medicina Kolegio de Jagelona Universitato (Pollando) prof. Dr habil. Bożena Muszyńska, Dr. Agata Kryczyk-Poprawa kaj Prof. Dr hab. Włodzimierz Opoka dum renkontiĝo en Szeged kun Dekano Prof.Dr habil. István Zupkó kaj Vic-Dekano Zsolt Szakonyi la 5-an de julio 2021. La proponitaj ĉeftemoj de la 22-a IMEK estas: 'La novaj eblecoj de diagnozado kaj kuracado de civilizaciaj malsanoj' kaj 'La metodo de Masayuki Sajonji – historio kaj nuna stato". En la sama tago la pola delegacio renkontiĝis kun la urbestro de la urbo Hódmezővásárhely Dr. Péter Márki-Zay (Hungary), kiu promesis sian helpon.

En la 22-a IMEK partoprenos Honora Prezidanto de UMEA D-ro Imre Ferenczy kaj aktuala Prezidanto de UMEA D-ro Christoph Klawe, kiuj invitas prelegojn en Esperanto kaj ankaŭ en la angla, hungara kaj pola lingvoj.

El EKO 29

Interesaĵoj pri Virtualaj Kvizoj

Marian Zdankowski,
gvidanto de E-kvizoj

Post tri partoj de Virtuala Kvizo dum la Kongreso la plej bonaj gepartoprenantoj gajnis premiojn:

- la plej sperta kvizemulo, ĉampiono **Valentin Melnikov**, ricevis UEA-membrecon laŭ MA-22 (Membro Abonanto por 2022j) + elektronikan abonon 2021 kaj 2022 al *Kontakto*.



- **Monika Molnár** (jam Dumviva Membro) ricevis abonon al *Kontakto* 2021 kaj 2022
- **László Szilvasi** (membro de UEA) ricevis abonon al *Kontakto* 2021 kaj 2022
- **Miguel Bento** akiris UEA-membrecon laŭ MA-22 (kun ĉiuj statutaj privilegioj)
- **Tatiana Terehova** konkeris UEA-membrecon laŭ MB-22 + *Kontakto* elektronike 2021 kaj 2022

Gratulon por ĉiuj!

Oni devas mencii, ke dum la tria tago, jam post la difinita tempo por solvi taskojn – Monika Molnár sendis konfirmon, ke ŝi solvis ĉiujn 20 kvizojn, t.e. 200 enigmojn, ĉar ĉiu kvizo enhavis po dek enigmoj (20 kvizoj x 10 enigmoj)... Bonega rezulto kaj nekredebla afero!

Valoras aldoni, ke elektronika koboldo malhelpadis dum la Kviz-renkontiĝo (!) ĉar kelkfoje ĝi malfruigis sendadon de konfirmoj pri solvitaj kvizoj, eĉ po dekkelkaj minutoj...

Jen du opinioj pri Virtualaj Kvizoj:

"...mi hazarde eniris vian ĉambron preskaŭ je la fino. Mi sciis tion, sed mi pensis, ne gravas, mi nur silente rigardos kion faras la aliaj. Vi instigis min ludi kaj… tre rapide la ludo "prenis" min. Se diri sincere, mi tre bone amuziĝis..."

Monika Molnár

"Por mi estis vera ĝuo partopreni la kvizojn. Ili rilatas al la lingvo Esperanto, al ĝeneralaj scioj, al kapablo rezoni kaj aliaj kvalitoj gravaj por saĝa persono. Teknike ĉio estas realigita bone kaj bele. Ne tiom ofte venas ebleco altnivele ekzerci la cerbon, ricevante plezuron kaj utilon."

Valentin Melnikov

Se Vi volus "gustumi" kvizon - iru laŭ la ligilo: https://learningapps.org/view7329573
Ĉiujn klarigojn vi trovos en la kvizo...

Internacia Tago de la Indiĝenaj Popoloj de la Mondo 2021

Indiĝenaj lingvoj
kaj la internacia lingvo Esperanto
por lingvaj rajtoj

Universala Esperanto-Asocio (UEA) salutas ĉiujn indiĝenajn popolojn, Unuiĝintajn Naciojn, la Altan Komisionon de UN por Homaj Rajtoj okaze de la Internacia Tago de la Indiĝenaj Popoloj de la Mondo, la 9-an de aŭgusto 2021.

La Deklaracio de Unuiĝintaj Nacioj pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj, ankaŭ tradukita al Esperanto, agnoskas la homajn rajtojn kaj fundamentajn liberecojn de indiĝenaj popoloj, kaj ankaŭ la rajton al memdeterminado, aŭtonomio kaj memregado. Grava parto de tiuj rajtoj estas la konservado, revivigo kaj evoluigo de iliaj lingvoj, kulturoj, tradicioj kaj institucioj. Pro tio, ni ĉiuj devas stariĝi flanke de la indiĝenaj popoloj, ĉar defendi iliajn rajtojn estas defendi ĉies rajtojn, kaj konservi la komunan heredaĵon de la homaro.

Nuntempe oni ja konscias pri la graveco de diverseco, kaj pri la ligo inter kultura diverseco kaj vivdiverseco. En tiu senco, la indiĝenaj scioj ludas gravan rolon en konservado de vivdiverseco. Tio estas alia plia kialo, por ke indiĝenaj popoloj havu plenan povon decidi pri tio, kio efikas sur iliaj landoj, akvoj kaj

komunumoj. Ili, per siaj lingvoj, estas la portantoj de valoroj kaj praktikaj konoj, kiuj montras kiel homaj socioj povas kunvivi harmonie kun la naturo. Ni, do, memorigas la ŝtatojn pri la sindevigoj alprenitaj.

Ĉiuj popoloj estas egalaj en sia homeco, kaj samtempe ĉiuj popoloj rajtas esti malsamaj, konsideri sin malsamaj, kaj esti respektataj kiel tiaj. Ĉi tiu ideo estas la baza ideo de Esperanto, kiel lingva kaj kultura fenomeno. Respekti, konservi kaj evoluigi la diversecon, kaj trovi bonajn manierojn interkomunikiĝi, interkompreniĝi kaj interkunlabori. La internacia lingvo Esperanto ne celas forigi la lingvojn de la unuopaj komunumoj sed nur esti uzata por interkomunumaj kontaktoj, dum ĉiu lingvo plene rajtas evolui en sia teritorio. Tio tute kontraŭas la nunan praktikon de grandaj lingvoj, kies parolantoj ja okupas pli kaj pli da spacoj koste de pli malgrandaj lingvoj.

Krome, ni atentigas, ke la Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj komenciĝos la 1-an de januaro 2022, kaj fariĝos temo de la Universala Kongreso de Esperanto, en Montrealo 2022, sub la titolo "Lingvo, vivo, tero: Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj". La Kongreso estos unu el la internaciaj aranĝoj, kiuj helpos lanĉi la Jardekon por la periodo 2022–2032. Ni antaŭĝojas pri la komenco de la Internacia Jardeko, por festi la kulturan kaj lingvan diversecon, antaŭenigi inkluzivigon kaj homajn rajtojn, kaj konstrui pacon kaj evoluigon.

Karaj informantoj, bonvolu pretigi vin por la 9-a de aŭgusto, Monda Tago de Indiĝenaj Lingvoj. Jen estas teksto por tradukado kaj utiligado por komunikoj en viaj lingvoj al viaj ĵuranlistoj.

Ankaŭ eblas utiligi la afiŝojn en diversaj lingvoj. Ili estas ĉi-tie: https://mallonge.net/fz .

Kontakto havas novan redaktoron

Paweł Fischer-Kotowski

En 2021 TEJO faris alvokon por nova redaktoro de la revuo *Kontakto*, ĉar post dek jaroj la ĝisnuna redaktoro Rogener Pavinski mem decidis fini sian longan altkvalitan deĵoradon en la posteno. De la alvoko venis tri kandidatiĝoj, de tri sufiĉe interesaj kandidatoj, kaj post tri intervjuoj kaj diskutado la Estraro de TEJO decidis akcepti Paweł Fischer-Kotowski kiel la novan redaktoron de *Kontakto*.

TEJO kaj UEA gratulas al Paweł pro la elektiĝo kaj kore dankas al Rogener pro lia longdaŭra kontribuo kaj malavara decido doni lokon al novaj fortoj.

Ni informas, ke ankaŭ mankas grafikisto por kunlabori kun Paweł, kaj por tiu posteno TEJO devos tre baldaŭ sendi sekvan alvokon.

Rogener Pavinski

Se vi volas subteni la laboron de *Kontakto*, konsideru ĝin aboni papere aŭ elektronike (ekde nur 6 EUR: uea.org/alighoj/abonilo) aŭ fariĝu individua membro aŭ patrono de TEJO (uea.org/alighoj/alighilo). UEA kuraĝigas la komunumon montri sian subtenon al *Kontakto*, al TEJO, al Rogener kaj al Paweł.

Gazetara komuniko de UEA 968

Vi povas esti aŭtoro de la *Kolombo de Paco* kaj la Reta Revuo! Por kontribui, skribu al la redakcio *redakcio@revuoesperanto.org*